

La Lasta Instruo Postlasita de Budho

仏遺教經 亦名仏垂涅槃略説教誡經

姚秦三藏法師鳩摩羅什訳

Kromnome <Resuma instruo kaj admono, kiujn Budho predikis ĉe la en- nirvaniĝo>.
La tripitaka budhisto Kumaraĝiva tradukis en la dinastio Jao-ĉin (Ĉinio).

1. La enkonduko

La granda majstro Gotamo la Budha predikis kaj konvertis unue Aĝnjata-kaŭndinĵa-n kaj laste Subhadda-n. Nome, ĉiujn Li gvidis, kiujn Li volis gvidi. Kaj Li kuŝiĝis inter la ĝemelaj sala-arboj por la ennirvaniĝo. Tiam jam en la meza nokto, ĉirkaŭe estis kviete, neniuj elvoĉis. Al ĉiuj disĉiploj tie kolektiĝintaj Li ekpredikis koncize la lastan instruon.

2. Ekzerco sin al virto en la sekulara mondo

2-1-1

Vi, bikuoj! Post kiam mi foriris, vi devas respekti kaj observi la ŝilaron. Ĝi montros al vi la vojon, kvazaŭ vi trovus lumon en mallumo, aŭ malriĉulo gajnus trezoron. Nun vi devas scii, ke la ŝilaro estas via alta gvidanto. Eĉ se mi plu vivus, mi ne diros malsamajn vortojn kontraŭ la ŝilaro.

Tiuj, kiuj observas la ŝilaron, devas ne komerci, havi sian domon nek bienon, ne posedi servistojn, sklavojn kaj brutojn. Vi devas esti for de produktado kaj propraĵo, kiel vi devas ne proksimiĝi al (danĝera) kratero.

2-1-2

Vi devas ne tranĉi arbon, kulturi kampon, kombini medikamenton, prognozi estontecon, observi stelaron, analizi lun-fazon nek aŭguri en kalendaro, ĉar ĉiuj ĉi tiuj ne taŭgas por via ekzercado. Estu diskrete, manĝu en regula tempo, kaj tiel vivu puranime. Ne enmiksi vin en sekularajn aferojn, ne amikiĝu kun laikoj. Ekzerci, serĉi medikamenton senmortigan, konatiĝi kun nobeloj kaj esti aroganta pri tio. Tiujn vi devas ne fari, sed ordigu la koron, kaj serĉadu la bodion kun la ĝusta kredo.

Ne kaŝu viajn neperfektajn partojn, nek pretendu kontraŭajn opiniojn (kontraŭ la mia), kaj per kiuj vi devas ne trompi aliulojn. Okaze de la 4 oferoj (=manĝaĵo, vesto, litaĵo, medikamento) de kredantoj vi devas ricevi nur necesajn kvantojn kaj ne akumulu restantajn partojn.

2-1-3

Nun mi klarigu, kion signifas observi ŝilaron. La ŝilaro estas fundamento de la ĝusta elkateniĝo. Tial kromnome ĝi estas la elkateniga ŝilaro. Se vi sinekzercos sub la ŝilaro, akiros budhan saĝon por ver-vekiĝo kaj sufer-estingo. Por tio vi devas tenadi

la sanktan ŝilaron senmanke. Kaj tiela tenado egalas la praktikadon de bonfaroj. Male, se vi malobservus ĝin, ne venos la merito de la bonfaroj. Per tiu ĉi klarigo vi povas scii, ke la ŝilaro estas la plej bela loĝejo por via trankvilo kaj virto.

2-2-1

Se vi jam povas bone observi la ŝilaron, sekvante regu la 5 radikojn (=okulo, orelo, nazo, lango, haŭto). Ne lasu tiujn senatentataj, kaj ne igu la 5 dezirojn (= vidi, aŭdi, flari, gustumi, tuŝi) invadi en vin. Ekzemple, paŝtisto regas bovon preninte vip-bastonon, kaj montras ĝin al bovo por, ke tiu ne damaĝu najbaran plantaĵon. Se la kvin radikoj ne estas regataj, el tio rezultas ne nur, ke la 5 deziroj ne konas limon, sed ankaŭ, ekzemple, se ĉevalisto ne regas malobeeman ĉevalon per buŝ-kateno, inverse ĝi tirus lin en truon. Sufero pro timo efikas nur al sola homo, tamen, neatendita damaĝo fare de la 5 radikoj daŭros por sinsekvaj generacioj. La donitaj damaĝoj estas tre grandaj, vi devas ne esti ne sigardaj.

2-2-2

Pro tio saĝuloj regas la 5 radikojn, ne submetas sin sub tiuj. Ili komprenas tiujn malamikaj, kaj ne lasas tiujn senbridaj. Se vi plu klopodos tiel, eĉ se iom restus ilia influo, pli malpli frue la 5 deziroj estingiĝos for.

Tiuj radikoj elvenas el la koro. Pro tio vi ja devas regi la koron. Terureco de la radiko superas tiun de la venena serpento, rabobesto aŭ obstina malamiko. Eĉ incendio estas ankoraŭ malpli por kompari. Kaj, la terureco de la radiko estas tia, kiam oni trovis mielon kaj saltetante pro ĝojo ne rimarkas profundan truon apud la piedoj. Kaj ankaŭ, oni ne povas haltigi iel ajn, kiam la radiko furiozas, kvazaŭ freneza elefanto sen kateno, aŭ simio trovinta arbon. Do, vi devas tuj alĝustigi vian koron, kaj neniam lasu ĝin laŭplaĉa.

Se vi lasas la radikon laŭplaĉa, la virto kulturita per viaj bonfaroj fariĝas vana. Male, se vi povas meti la koron en certeco, povos gajni ion ajn, kion vi volas. Do, des pli, vi, miaj disĉiploj, devas persvadi la koron (per diligenta ekzercado).

2-3

Bikuoj! Kiam vi ricevas regalon de manĝaĵoj, vi devas preni la donacitajn, kvazaŭ preni medikamenton. Nome, vi devas ne preferi la kvanton laŭ via plaĉo. La kvanto de manĝaĵoj sufiĉas nur por tenadi vian korpon, kaj tiele nur forigu la malsaton kaj soifon. Kvazaŭ abeloj vizitas florojn. Ili nur prenas mielon, sed ne difektas la figuron nek odoron de floroj, ankaŭ bikuoj devas fari tiel. Kiam oni oferas aĵojn, vi ricevu nur necesan parton, kaj ne fuŝu pro via troa deziremo la rezulton de viaj bonfaroj (=virtoj) kulturitaj ĝis nun. Ekzemple, supozante la forto-limon de bovo saĝa laboristo ne ŝarĝas la bovon per troa varo por, ke ne forkonsumu la bovan energion.

2-4-1

Vi, bikuoj, devas pene sinekzerci en la tago, ne perdu la tempon sen-fare. Kaj same faru en vespero kaj frumatene. En la nokto legu sutrojn kaj ripozu. Pro la kleŝo nomata dormemo vi ne vane pasigu la vivon, ne finigu senfrukte la vivdaŭron.

La fajro nomata malkonstanteco forbruligas ĉion. Pro tio vi devas ne esti

maldiligenta por via frua ver-vekiĝo. La bando de kleŝoj ĉiam gvas kaj mortigas homojn. Ĝi estas pli terura ol obstina malamiko. Kial oni povas facile dormadi senatente!? Vi mem devas vekigi kaj esti singarda. La venena serpento nomata kleŝo loĝas en via koro, kvazaŭ nigra serpento dormus en via ĉambro. Ĝin vi povas forigi per hoko nomata <observi la ŝilaron>. Kiam la serpento eliris el vi, nur tiam vi povas trankvile dormi. Tiu, kiu ankoraŭ havas la serpenton sed dormas, nomiĝas senhonta homo.

2-4-2

Vesti sin per <honti al si> estas la unua en diversaj kostumoj por ĝustigi la koron. Tiu vesto bone forkroĉas, kvazaŭ fortika fera hoko, malbonan intencon de la koro. Pro tio miaj disĉiploj devas ĉiam vestadi la koron <honti al si>. Tion vi devas ne forgesi eĉ momenton. Se vi perdus la veston, vi ankaŭ perdus la virton pene kulturitan ĝis nun. Kaj tiu, kiu konas <honti al aliaj>, estas rigardata tiel, ke li praktikas bonfaron. Se oni ne havas tiun koron, li estas nenio alia ol bestio.

2-5-1

Vi bikuoj! Malgraŭ, ke oni petis vi prediki, sed kiam li ne povas kompreni la predikon unu post alia, vi devas ne koleri lin regante vian koron. Estu diskrete kaj ne diru kalumnion. Se vi kolerus senbride, tio baros <vian vojon>, kaj perdus la meriton de la virto.

La alteco de virto per eltenado estas senkompare alta ol observi ŝilaron aŭ asketadi. La ekzercanto, kiu ekzercas per eltenado, estas nomata potenca sinjoro. Male, oni ne nomas tiun saĝulo iranta <la vojon>, kiu ne ricevas venenon de kalumnio kiel ĝojon kvazaŭ trinki amriton (=la ĉielan trinkaĵon). Se diri la kialon, la damaĝo de la kolero senvalorigas viajn ĉiujn bonfarojn, kaj malaltigas la renomon de vi, ricevitan ĝis nun. Tia regreso ne estas bonvena en iuj ajn generacioj. De tio vi devas scii, ke la kolera koro estas pli furioza ol fajrego. Ĉiam vi devas esti singarda por ne eniri en la fajregon. Ne troviĝas pliforta malamiko ol la kolero, kiu senvalorigas la virton.

2-5-2

Ĉar laiko havas deziremon kaj ne sinekzercas, la kolero povus esti permesita, se li ne povas regi la koron. Dume la elirinto (=budhisto) estas ekzercanto, kiu devas esti sen-dezirema. Malgraŭ tio, se li kovas koleron, estas tre malkonvene. Tio similas al neatendita fulmo el klare malvarma nuboj. (Tio ne okazu.)

2-6

Vi, bikuoj! Vi mem razis la kapon, forlasis ornamaĵojn kaj vestas vin per makulita ŝtofo. Kaj portante bovlon vi devas vivi per almozado same kiel mi, kiel vi nun vidas. Kiam naskiĝis aroganta koro ĉe vi, vi devas tuj ĝin forigi. Kreskigi la arogantan koron estas malŝatinde ankaŭ por laikoj, des pli, por ekzercantoj, kiuj serĉas <la vojon>, kaj kiuj faligis sin el la socia klaso kaj sinekzercas per almozado.

2-7

Mi diru al vi. Flatemo estas kontraŭa al <la vojo>. Tial vi devas esti rektanima. Kaj vi devas scii, ke la flataĵo estas nur perfida kaj trompa vorto. Konsekvence ĉe <la vojiranto> tiu vorto ne troviĝas. Pro tio vi devas esti honesta kaj diskreta, kiel baza vivsintenado.

3. Havigi al si la virton de bodisatto en la budha mondo

3-1

Vi devas scii, ke ege dezirema homo estas ankaŭ ege profiteza, des pli suferema. Dume tiu, kiu estas et-dezirema, ne atendas profiton. Pro tio li ne bezonas timi suferon. Tial vi devas tuj lerni la et-deziremon. Ĝi (tamen) plimulte alportos al vi diversajn meritojn. La et-dezirema homo ne flatas nek submetiĝas sub potenculo. Kaj li ne kateniĝas de la 5 radikoj (=okulo, orelo, nazo, lango, haŭto). Tiu, kiu lernas et-deziremon, estas trankvila, ne havas ĉagrenon nek timon. Je ĉiuj okazoj li ĉiam havas marĝenon, neniam io mankas al li. Kaj li povas atingi la nirvanon. Tion mi nomas <la merito de la et-deziremo>.

3-2

Se vi volas eviti diversajn suferojn, devas sinekzerco per la sufiĉ-kono. Tiu ekzerco (tamen) promesas al vi abundon kaj komforton. Tiu, kiu konas la sufiĉ-konon, sentas sin komforta, eĉ se li kuŝas sur la tero. Sed tiu, kiu ne konas ĝin, ne estas kontenta, eĉ se li loĝas en la ĉiela palaco. Tiu, kiu ne konas la sufiĉ-konon, estas povra spite al sia riĉaĵo. Male, tiu, kiu konas ĝin, estas bonhava, kvankam malriĉa. Tiu, kiu ne konas la sufiĉ-konon, estas ĉiam katenita de la 5 deziroj (=objekto, voĉo,odoro, gusto, tuŝo), kaj kompatita de tiu, kiu konas la sufiĉ-konon. Tion mi nomas <la merito de la sufiĉ-kono>.

3-3

Se vi volas vivi trankvile, sen-embarase kaj komforte, devas loĝi sola for de la socio, kiu perturbas la koron. Tia persono loĝanta en kvieta loko estas respektata kaj ankaŭ protektata de la dio Indra kaj aliaj diuloj. Por tio vi devas loĝi sola for de la familio kaj de la socio, kaj pripensi kiel pereigi la suferon. Male, se vi volas ĝui la vivon kun multaj homoj, devas akcepti ankaŭ suferon pro la multeco. Ekzemple, se svarmas (tro) multe da birdoj sur grandan arbon, ĝia branĉo povus velki aŭ rompiĝi. Komunikigi kun socio signifas droni en socian suferon, kvazaŭ kaduka elefanto falinta en marĉon, kiu ne povas elrampi per si mem. Tion mi nomas <la merito de sol-loĝado>.

3-4

Kiam vi klopodas fervore, troviĝas nenio ne-realigebla. Tial vi devas esti fervora. Ekzemple, eĉ malgranda akvofluo povas trui ŝtonon. Se ekzercanto fojfoje ripozas, nenio plenumiĝos. Ekzemple, kiam vi volas havi fajron per frotado de lignetoj, estas malfacile havi fajron, se vi ripozis antaŭ ol la lignetoj ardiĝas. Tion mi nomas <la merito de fervoro>.

3-5

Se vi volas havi bonan gvidanton kaj bonan kolegon, ne troviĝas alia rimedo, ol ne forgesi vian kredon. Se vi ne forgesis ĝin, la bando de kleŝoj ne povas enŝteli en la koron. Pro tio vi devas ĉiam tenadi la firman kredon. Se vi perdus la kredon, ankaŭ perdus la meriton. Se via kredo estas firma, vi povas eviti la damaĝon, eĉ se vi loĝas kun la bando nomata la 5 deziroj. Ekzemple, kiam oni estas en tendaro, se li surportas kirason, bezonas timi nenion. Tion mi nomas <la merito de neforgesi kredon>.

3-6

Se vi povis regi la koron, la koro estas en samadio. Se la koro estas en samadio, vi povas koni la veran (=darman) aspekton de la mondo, en kiu ripetas apero kaj malapero (=la malkonstanteco). Tial vi devas ĉiam diligente lerni kaj sinekzerci al samadio. Se vi akiris la samadion, la koro ne estas sporada. Ekzemple, oni, kiu ŝparas akvon, ĉiam prizorgas digon. Ankaŭ ekzercantoj same prizorgu. Por la akvo nomata maha-saĝo (=budha saĝo) vi diligente sinekzercu por, ke ne liku la saĝo. Tion mi nomas <la merito de samadio>.

3-7

Se vi havas maha-saĝon (=la budhan okulon), ne havas la koron deziroman nek obsedatan. Ĉiam vi devas esti atenta por, ke ne perdu la maha-saĝon. Tio ĉi estas la lerta metodo akiri la el-kateniĝon (=ennirvaniĝon) en mia instruo. Tiu, kiu ne observas la instruon, ne estas nomata <la voj-iranto>, nek laiko, entute sennoma, kiel nomi lin mi ne scias.

La vera (=budha) saĝo estas fortika ŝipo, per kiu homoj navigas sur la maro nomata la sufera vivo havanta maljuniĝon, malsaniĝon kaj mortemon. Kaj ankaŭ ĝi estas granda lumo, kiu lumigas tenebron (=senscion), efika medikamento por ĉiuj malsanuloj kaj akra hakilo kontraŭ kleŝoj. Pro tio vi povas multigi meritojn per maha-saĝo en la lernado, studado kaj praktikado. Se troviĝas homo, kiu vidas ion per maha-saĝo, eĉ se li havas nur homan okulon, li estas nomata klar-vida homo. Tion mi nomas <la merito de mahasaĝo>.

3-8

Vi, bikuoj! Diversaj senutilaj disputoj perturbas la koron. Eĉ se oni fariĝis elirinto (=ekzercanto), se disputas pri senvalora afero, li ne atingos la ver-vekiĝon. Tial vi devas tuj forigi furiozeman koron kaj ĉesi senutilan disputon. Se vi volas gajni la ekstremajn komforton (=nirvanon), devas forigi la damaĝon de la disputo. Tion mi nomas <la merito de sen-disputo>.

4. Klare montri la ekstreme profundan virton

Vi, bikuoj, devas ĉiam rektanime forpeli maldiligentemon por akiri virton, kvazaŭ eskapi de venĝemaj malamikoj. La virto, kiun Budho kun granda kompato klarigis, estas nun fin-klarigita senmanke. Vi devas nur sinekzerci por la virto kaj la merito. Sidante inter montoj, en sen-akva rivereto, sub arboj aŭ en kvieta ĉambro vi devas ne forgesi tion, kaj sinekzerci per montrita metodo. Instigante vin mem vi devas fervore sinekzerci. Se vi vane mortus senfare la farendan aferon, vi nepre pentos. Mia afero

similas al tio, ke saĝa kuracisto rekomendas validan medikamenton ekzakte rekoninte la malsanon. Ĉu la malsanulo prenos la medikamenton aŭ ne, ne estas kulpo de la kuracisto. Aŭ lerta voj-gvidanto montras ĝustan vojon al vojaĝantoj. Sed ĉu ili laŭiros la vojon aŭ ne, ne estas eraro de la gvidanto.

5. Konstati kaj klare montri la pravecon de la instruo (pri la 4 faktoj)

“Se vi havas dubojn pri <la 4 faktoj>, nun vi demandu. Estas ne aprobinde, se vi lasas la dubojn ne solvitaj.” Tiel Bagavato alparolis 3 fojojn. Sed la kunvenantoj eldiris nenion, ĉar neniu jam havas dubojn. Tiam Anurudda reprezentante aldiris “Bagavato nia! Eĉ se la luno estus varma kaj la suno malvarma, <la 4 faktoj> predikitaj de Vi estas neniam malveraj. <La sufera fakto> estas ĝuste <la sufero>, sed neniam <la ĝojo>. <La kolekto> estas ĝuste <la kolekto de suferoj>, nenio alia krom ĝi troviĝas. Kiam estingiĝas <la sufero>, samtempe estingiĝas <la kaŭzo>. Se < la kaŭzo> malaperas, ankaŭ <la rezulto> malaperas. <La vojo>, kiu estingas la suferon, estas ĝusta metodo, kaj nenia alia metodo troviĝas. Bagavato nia! Ĉi tie kunvenintaj bikuoj jam komplete scias <la 4 faktoj>. Kaj ni ne plu havos dubojn.”

6. Solvi la dubojn por la kunvenintoj, kiuj ankoraŭ ne komprenas la instruon

6-1

Ĉiuj kunvenintoj vere malĝojis vidante la Majstron forironta el la mondo. Kaj aliaj kunvenintoj, kiuj por la unua fojo aŭskultis la Budhan instruon, tuj partoprenis en la samgon kiel disĉiploj, kvazaŭ ili ekvidus nun irotan vojon per fulmo en malluma nokto. Dume tiuj, kiuj jam komencis sinekzerci kaj suriras la suferan maron (=vivadas en la sufer-plena mondo), pensis, kial Budho devas tiel frue foriri. Budho jam sciis, ke ĉiuj disĉiploj komprenis <la 4 faktoj> pere de la vortoj far Anurudda, sed por firmigi ilian kredon, denove komencis prediki kun la granda kompato.

6-2

Vi, bikuoj, devas ne malĝoji pro mia forpaso. Eĉ se mi plu vivus por la kalpao (=vivdaŭro de la universo), renkonto nepre havas finon, nepre venos disiro post renkonto. Mi jam ĉion instruis pri la meritoj por vi kaj por la aliaj. Eĉ se mi plu vivus, jam ne troviĝas pli aldoninda. Mi jam gvidis ĉiujn, kiujn mi devis gvidi, ne temante, ĉu ili estas la ĉieluloj aŭ homoj. Al tiuj, kiuj ankoraŭ ne komprenis mian instruon, mi nun donis motivon por instruiĝi. Nome, se de nun miaj disĉiploj disvastigos mian instruon, tio signifas, ke la darma korpo de la Tatagato (=Budho) plu ekzistos kaj ne estingiĝos.

6-3

Pro tio vi devas bone kompreni; La mondo estas tiele malkonstanta, kaj renkontintoj nepre devas disiri. Pri tio vi devas ne ĉagreniĝi, ĉar la mondo tiel fluas. Dume vi devas klopodi al la frua elkateniĝo. Kaj vi devas forigi mallumon per klara lumo de la budha saĝo. La mondo estas rompiĝema, nenio estas senŝanĝe solida. Nun ŝajnas al mi, ke eniĝi en nirvanon estas, kvazaŭ mi resaniĝas de severa malsano. Tiel nomata la korpo estas banala aĵo, kiu flosas sur la granda maro de la kvar suferoj (de vivado, kadukiĝo, malsaniĝo kaj mortemo). Kial saĝaj personoj ne povas ne ĝoji

forĵetinte sian korpon, kvazaŭ ili mortigus malbenindan malamikon!

7. Negi mem-ekzistecon kaj montri puran sen-memecon

Bikvoj! Vi devas ĉiam rektanime serĉadi <la vojon>. Ĉiuj estaĵoj, kiuj moviĝas kaj ankaŭ ne moviĝas, nepre pereas kaj neniam estas konstantaj.

Karaj! Momente estu silentaj. Ne parolu! Jam la tempo venis. Nun mi volas eniri en la nirvanon.

Tiu ĉi estas mia lasta instruo.

La sutro de la lasta instruo Fino